En 1898, le gouvernement des Etats-Unis avait nommé une Commission chargée de faire rapport sur cette question du choix d'une langue internationale. Cette Commission recommanda l'Esperanto. Voir "Proceedings of the Philosophical Society," vol. xxv, p. 3.

En apprenant cette nouvelle, l'auteur de l'Esperanto était dans la jubilation: le pauvre homme ne connaissait guère nos moeurs politiques et ignorait que, en Amérique, les Commissions sont créées et mises au monde pour faire un rapport élaboré, clair, précis, bien étiqueté, bien ficelé sur beau papier de luxe, afin d'être bien doucement, bien discrètement mis.... dans les oubliettes, pendant que messieurs les Commissaires retirent leurs honoraires.

Quelques amis de l'auteur, constatant que les choses ne progressaient guère, lui demandèrent ce qu'il ferait au cas où le gouvernement américain ne donnerait pas suite au rapport de la Commission.

"Je ne sais", dit le docteur, "mais ce "n'est pas présumable, au contraire, la "chose va être soumise au corps diplo- "matique, et les gouvernements s'enten- "dront certainement sur une question "aussi importante."

— Gouvernements, — gouvernements, — si vous attendez après les gouvernements, vous attendrez longtemps. Les gouvernements et les gouvernants n'ont aucun intérêt à l'adoption d'une langue internationale, et ils nous en ont donné la preuve en insistant pour imposer leur idiome respectif; loin de souhaiter une langue internationale, les gouvernants sont plutôt portés à combattre cette proposition; car ce projet n'est pas de nature à raffermir les potentats, dans les pays monarchiques, et n'amènera pas de majorités aux candidats dans les pays républicains.

Ce sont les gouvernés, les individus mêmes qui sont les victimes de la diversité des langues; ce sont eux surtout qui souffrent de ces inconvénients et qui en subissent toutes les conséquences; c'est donc à eux que nous devons nous adresser, puis, lorsque le travail individuel nous aura fait réussir, alors, sous la pression populaire, les gouvernements seront forcés d'agir.

— Faites comme vous l'entendez", fut la réponse du docteur. "Quant à moi, "vous le savez, je suis pauvre, sans in- "fluence, et ne puis que vous donner "mon appui moral."

Et, dans ces circonstances, les espérantistes de la première heure se mirent à l'oeuvre. D'abord on se réunit dans une maison privée, puis on forma un premier cercle; pour s'habituer à écrire la langue, on composa quelques ouvrages ; bientôt d'autres cercles se formèrent en Russie, de là l'Esperanto pénétra en Suède, de la Suède à l'Allemagne, de l'Allemagne à la France, et, au bout de quelques années, par la seule force de son mérite, — car il est notoire que les espérantistes sont pauvres, sans influence — l'Esperanto a conquis le monde.

Aujourd'hui, à ma connaissance personnelle, il y a des écoles gratuites pour l'enseignement de l'Esperanto, à Paris, Besançon, Dijon, Grenoble, Havre, Lille, Lyon, Nimes, Montpellier, Nice, Reims, Varsovie, Smolensk, Vladivostock, Archangèle, Stockholme, Londres, Keighley, Vienne, Prague, Brno, Philipopole, Anvers, Bruxelles, Turin, Madrid, Lima, Chicago, San Francisco, Montréal, et combien d'autres endroits dont j'oublie les noms.

La langue internationale possède de nombreux organes dévoués à sa propagande, citons : "La Biblioteko", "La Lingvo Internacia", "l'Esperantiste", "La Lumo", "Le Rondiranto", "l'Esperanto", "Le Holanda Pioniro", "Le Belga Sonorilo", "l'Esperantista", "La Revuo Internacia", "la Germana Esperantista", "la Bohema Esperantista". En outre de ces organes officiels, il existe des centaines de revues publiant constamment des colonnes en langue internationale. Je cite encore de mémoire : "Concordia", le "Petit Bleu", "l'I. C. C. P.", "Svet", "Tidling", "Review of Reviews", "Le Bien Public", "El Dependiente", "Revista de Sciencas", et je ne saurais dire combien de journaux de sténographie, et d'organes de philatélistes.

Pour terminer cette oeuvre essentiellement humanitaire, il suffit d'augmenter la force déjà acquise, et à cette fin, nous, les espérantistes, faisons appel à tous les hommes de bonne volonté, et, comme vous avez pû le voir, monsieur le rédacteur, nous ne prêchons pas toujours dans le désert.

Ricevu, la esprimon de mia danko.
Tute Via,
A. SAINT-MARTIN.

---

### L'ESPERANTO

Montréal, 7 mars 1903.

A M. le Directeur,
de "La Presse".

Veuillez publier cette lettre adressée à M. A. Saint-Martin:

Montréal, 2 mars 1903.

Mon cher St-Martin,

J'ai parcouru bien à la hâte le manuel espérantiste que vous m'avez passé.

J'ai constaté en effet que cette langue peut s'apprendre en quelques heures.

J'ai étudié environ trois heures et je suis en état de lire passablement.

Votre tout dévoué,
PHILIPPE DEMERS.

---

### ANONCO

Dimitr C. Kulev, komercisto en Burgas, Bulgaria, deziras korespondadi kun fremdaj geesperantistoj, havantaj de 10 ĝis 25 jarojn, per ilustritaj poŝtkartoj; respondas al ĉiuj demandoj tuj. Adreso estas: Al Sro. Dimitr. C. Kulev,
Bourgas-Aitos,
Bulgarlando.

# EĈ LA BRAVULOJ TIMAS

Rakonto ĉe l'antaŭa ferdekrando

Bela vetero, kvieta maro. Puŝata de freŝa okcidenta venteto, la krozŝipo "Amiral", vojirante Ternovon, antaŭeniras rapide. Sidante ĉe l'ekstrema pinto de l'antaŭa supra ferdekrando, tri maristoj fumas interparolante, kaj interparolas fumante. Estas Klodiuso Lamigran'o, provenculo malgranda, malgrasa, diktrunka, bronzokolora, Johano Madoik'o, britanulo, bona koloso, kaj Korenteno Kohervan'o, novulo.

Ba! ekkrias la novulo, bravulo kiel vi Lamigran'o, malnova maristo kiel vi Madoik'o, vi konfesas ke vi timis? Tio ne devis esti pro ordinaraj aferoj. Jen historioj, kiujn mi ŝatus aŭdi rakontatajn de vi, en tago kiel la hodiaŭa, kiam oni havas nenion fari, krom pasigi la tempon.

"Se tio amuzos cin, maristeto, ekdiris Lamigran'o, mi bonvole komencos, kondiĉe ke Madoik'o rakontos siavice. Sed, ne esperu aŭdi unu el tiaj misteraj, fantaziaj historioj pri revenantoj, kiajn oni rakontas al la infanoj. Ne. Se mi tremis iam en mia vivo, tio estis antaŭ vera, tre reala dangero. Nur, jen: ĝi alvenis subite, nedirinte atentu! Vidas ci, junuleto, vane oni estas fierdecida, kuraĝega, tion elmontrinte sur multaj batalaj kampoj, kie oni kvietege staris meze de la klugoj kaj klugegoj: mi certigas, kaj tre ruza kiu kontraŭdiros, ke la surprizo, la subiteco, la malkonateco povas fari la plej bravan timema. Cetere, aŭskultu mian historion; ci min diros poste, se anstataŭ mi, iu alia ne estus sentinta, same kiel mi, teruran tremfroston.

"La scenejo estas en Tonkino. De ses monatoj, la "Triomphante" (triumfanta), sur kiu mi dejoris, estis ankre en la golfeto de Alongo, proksime de l'enfluejo de la rivero "Rouge" (ruĝa). Tiun tempon, la loko ne estis senriska. Sur la bordoj de la rivero estis sufiĉege da "Nigraflaguloj". Tial, por eviti senutilajn batalojn, la tuta ŝipanaro estis ordonita resti sur la ŝipo.

"Nokton, jen la maŝino por distili la marakvon malordiĝis. Tuj dek maristoj, mi inter ili, estis ordonitaj iri sur la teron por ĉerpi akvan provizon. Tuj kiam ektagiĝis, oni amasiĝis nin en la vaporŝipeton, kun kvanto da bareloj, kiujn ni estis plenigontaj ĉe l'rivero. Nia laboro finita, restis al ni kelkaj horoj da libereco. Ni ekiris promeni. "Precipe, estis rekomendinta al ni la maroficiro, ne disiĝu, marŝu kubuto ĉe kubuto!" Jen kvar kolegoj kaj mi ekvojiris brako ĉe brako. Sed mi deziregis esti sola kaj marŝi en libereco.

Ĉe l'unua turniĝo de l'vojo, mi subite lasis la amikojn. "Al la revido kunuloj!" Kaj mi baldaŭ troviĝis tute sola, meze de kamparo, en vastega rizejo, limigita malproksime, post interspaco da ĉirkaŭ tri mejloj, de maso da ŝtonegoj brunaj, ĉirkaŭitaj de altaj dornaj arbetajoj.

"La suno ne estis ankoraŭ tre varma. Varmeta venteto ondigadis la kampojn. Mi enspiregis l'aeron, feliĉa paŝadi sur la firmaĵo. Malfeliĉe, en Tonkino, tiu firmaĵo surhavas multe da bubaloj. Ĉie, kie estas marĉoj, oni estas certa renkonti anaron da tiuj bestoj, tiel profunde enherbaro. Nu! Ĉio bone. Tiun fojon, nenio min okaziĝos.

"Subite, tiam ke mi juĝis min sava, juna bubalo blekante eliris el la ŝlimejo kaj antaŭensaltis al mi.

"Ne perdinte la saĝon, senembarase, mi rigide fiksis min sur miaj kruroj fleksitaj, kaj pretiĝis min por eviti la frapon.

"Mi devas konfesi ke, estante nur infano, mi dresis, en mia lando, la maldelikatajn bovovirojn de "Camargue" (Kamarg'o). Ekkapti la bestojn al la kornoj, ilin ĵeti teren per ekskuo, estas ludo, kiun oni nomas en Provenco "la ferrade". Estante deksesjara, mi estis tiel ekzerca je tio, ke multafoje, senintermanke, mi gajnis la unuan premion. Tion mi diras



KION MI VIDAS? LA TUTAN BESTARON POST MI.

ŝlimiĝintaj, laŭ ilia kutimo, ke apenaŭ oni distingas iliajn dikajn okulojn kaj fumiĝantaj naztruojn.

"Tion mi ne sciis. Kia estis mia surprizo, pasante antaŭ marĉoj, ekvidi centon da bubaloj, kies nur la kapoj superas! En la malproksimo, oni estus dirinta: jen kampo da kornoj."

"Atentu! mi diris al mi, tiuj kvarpiedloj havas la reputacion ne esti oportunaj. La demando estas ne ilin elvoki."

"Senbrue, paŝete, mi do laŭiris la marĉojn. Ĉe mia ekpaso, la patriarkoj de l'bestaro ne movetiĝis. Ili ŝajnis ne vidi min. Cetere, mi pozitive rampis en la por klarigi al vi, kial mi ne ekscitiĝis supermezure, pro la kolero de l'bubalido. "Lamigran'o, amiko mia, ekpensis mi, ree vi tuj ekzercos vian manon." Kaj mi atendis kuraĝe.

"La bubalo alvenis al mi, furioza, plastrigita de ŝlimo. Mi ekmoviĝis, kaj eksaltis. Unu! du! Kaj teren la besto dorse ruliĝis.

"Mi ne atendis, kredeble, ĝis kiam ĝi releviĝos.

"Tuj post tiu faro, mi ekkuregis, mi deiris ne postulante mian restajon. Apenaŭ mi estis trairinta ducent metrojn, kiam mi aŭdis malantaŭe inferan bruon,

surdan, mallaŭtan galopon. Ne haltante, mi rigardis malantaŭen. Kion mi vidas? La tutan bestaron post mi, kvarcent pezajn piedegojn galopantajn al mi! Tiun fojon, mi ne kontraŭstaris arogante. Mi duobligis mian rapidiron. Mi ne nur kuris, mi flugis. L'aero siblis ĉe miaj oreloj. Ve! Nur restis al mi unu rimedo por mia saviĝo: atingi tiujn ŝtonegojn kaj densajn arbetaĵojn, kiujn mi estis ekvidinta malproksime, kiam mi komencis mian promenon. Ili jam ne estis tre malproksimaj. Se mi sukcesus ilin atingi, mi estus sava. Sed ĉu mi estos sufiĉe forta por tio? Jam mia spirado malfaciliĝis, mi sentis min malfortiĝanta. Momenton, eĉ ŝajnis al mi ke la monstroj malpliigas la interspacon. Decida vendi karege mian haŭton, ĉiam kurante, mi eltiris mian pafileton el mia zono. Mi pretigis ĝin per febra mano. Poste, ĉiam kurante, mi turnis la kapon kaj rigardis malantaŭen. Ha! kia vidaĵo, infanoj miaj, Figuru al vi mason brue defalantan, vivan lavangon malsuprenirantan post mi! La bubaloj tiel raĝe min persekutadis ke ili puŝas unuj la aliajn; la flankaj surĵetas sin sur la mason por enlokiĝi; aliaj elstariĝas kaj antaŭeniras stare, preskaŭ portataj de siaj najbaroj. Ŝajnis esti unu grandega besto monstra, fantazia, kian oni vidas en teruraj sonĝoj, senforma maso da fumiĝanta viando tute kovrita de kornoj!

“Sed juĝu kia estis mia mirego. Kiom mi alproksimiĝis la ŝtonegojn, tiom la bubaloj ŝajnis malakceli sian kuron. Ili estis kvazaŭ timigitaj. Subite la anaro haltis tute. Dum momento, kvazaŭ ŝanceliĝaj, la bubaloj restis tie, enspirantaj l'aeron plennaze. Poste, ili disiĝis, el ili la pli multo reen iranta. “Estu laŭdata Dio, pensis mi”; mi estis sava. Nun, jen fine la ŝtonegoj. Ilin konturiĝis vojeto mallarĝa, suprenira, torda, superplektita de dornaj arbetaĵoj. Ĝin mi eniĝis facilmove, mian pason ebligante, kiel eble plej bone, tra la dornarbetaĵoj kunplektitaj. Suprenrampante, diskaptante, mi alvenis al speco de groto, formita de du grandegaj teraj blokoj. Ili kuniĝis supre, kaj malproksimiĝis grade ĝis la malsupro, tiamaniere ke ĉe la fundamento estas interspaco malplena, tiel nigra kiel forna faŭko. “Bona afero! pensis mi, jen estas groto en kiu devas esti malvarmete. Mi do tuj povos senĝene ripozi”. Mi alpaŝis al la enirejo de l'groto. Mi estis ĉe l'sojlo, mi ĵus estis eniranta, kiam subite....

“Ne, ne, nenio povas doni ideon pri la rapideco de tiu atako. Risorto, kiu malstreĉiĝas, granda ombro ĵetita, kiu spruĉas el la mallumo, io fleksebla, subita kaj multepeza; peza maso, kiu defalas sur min, tia estis mia unua impreso. Mi ne komprenis, ne sentis ion, krom tio, ke mi falas premegata sub pezo; varma elspiraĵo tuŝetis mian vizaĝon. Tiam, instinkte, senvide, mi mallevis la pafileton, kiun mi havis en mia mano. Kvar ekpafoj, mallaŭta stertoro, sento pri granda korpo. Mi restis momente senpensa. Poste, iom post iom, mi resentis. Mi malfermis la okulojn. Post du paŝoj de mi, kuŝis malfirma, senmova tigro, morte vundita.

“Unue, mi palpis miajn membrojn. Nenio rompita. Nur ŝultro min iom doloris. Per sangaj gutoj sur mia mano, mi konstatis min vundita. Tio estis negrava. Nur ungoskrapo malpeza. Nu! mi estis senpensa. Poste, per subita salto, mi antaŭensaltis kaj forkuregis, kvazaŭ post mi ankoraŭ estus anaro da bubaloj.

“Mi estis tiel konfuza, ke mi eĉ ne estis pensinta kunpreni mian pafileton. Ĝi restis sur la batala kampo. Sed tiam, mi ne estis plu ĝin bezononta. La bubaloj estis foririntaj. Cetere, mi havis la saĝon fari kurbiĝon por eviti la marŝojn.

“Kurante, mi rekonsciiĝis, mi resaĝiĝis, kaj mi hontis pri mi.

“Kial, pensis mi, kiam ĉia dangero estas forigita, kiam mi retrovas min preskaŭ sana kaj sava post tia aventuro, tiam mi ektremas de ĉiuj miaj membroj? Nu, Lamigran'o, diris mi al mi mem, ci nur estas timulo. Ci ne estas viro!



MI RESTIS MOMENTE SENPENSE.

ŝanca. Cetere, mi estis tute fiera esti tiel bone celinta. Hazarda trafo, vere, sed tio ne estas grava! La besto estis bone trafita. Besto reĝa, kredinde. Mi vidis ĝin baraktantan pro lasta spasmo. Ĝiaj piedegoj, ĝiaj teruraj piedegoj malstreĉiĝis. Kaj poste, nenio. Ĝi estis morta.

“Nu! ĉu tio estas kredebla? Estis en tiu sama momento ke mi timis, ho! sed estis malsaĝa, nerezona timo. Mi, kiu ĝis tiam ne tremis, tio estis kiam mi vidis la korpon malviva de mia malamiko, rigardis ĝiajn timigajn kojnajn dentojn, inter kiuj mi preskaŭ estis pistita, ke mi ektimegis. Mi tremetis, mi akse turniĝis sur la kalkanoj. Tiel mi restis dum kelkaj minutoj malkvieta,

“Sed vane mi min insultis, mia malsaĝa timo persistis. Estis tute neatendita cirkonstanco, kiu remiigis min. Figuru al vi, ke ĵus kiam mi pasis, ĉiam kurante al la maro, antaŭ granda bambuareto, el ĝi mi vidis du enlandulojn elirantajn, kiuj sin metis antaŭ mi, kun mieno minaca, svingantaj, unu, specon de granda hakilo enigita en la ekstremajon de bastono, la alia, malnovan pafilon kun longa bronza tubo.

“La vido al tiuj “Nigraflaguloj” malgrandaj, malfortikaj, tiel ridindaj pro iliaj korpoj delikataj kaj batalilo) ridindegaj, kreis ĉe mi bonfarantan reenagon. Tuj mi remiiĝis, mi refariĝis la antaŭan Klodius'on. Estas vere ke ili estis sufiĉe ridindaj tiuj nigruletoj, kiuj pretendis

malebligi la pason de mi, kiu ĵus batalis, unu post la alia, bubalon kaj tigron!

"Mi pretigis min, antaŭensaltis sur ilin, dirante: "delokiĝu, mikrobuloj, alie mi vin englutos!" Tiu, kiu havis longtuban pafilon, celis kaj maltrafis min. Lia kamarado eklevinte sian hakilon, tuj mi ĝin elŝiris el liaj manoj. Poste, mi ekkaptis unu el la ĥinoj al la kolo kaj premis, premis, piedofrapante dume, por liberigi min de la alia. Sed la malbena marrabisto sukcesis tamen ŝovi sin ĝis mi. Li tiel kruele mordis mian brakon, ke mi ellasis la tenon. Tamen, jam estis senpova tiu, kiun mi estis teninta. Nun, la vico de l'alia. Kuniginte miajn lastajn fortojn, mi ekkaptis la enlandulon, kiu ĵus mordis min, sublevis lin de tero.... Ĉe miaj piedoj la rivero Ruĝa fluas vivega. Ha ! tio ne estis daŭra. Sufiĉa tempo por kalkuli ĝis tri.... Kaj antaŭ ol li havis la tempon diri "uf!" jam mia ĥino estas en akvo. Tie li baraktis dum iaj momentoj kaj malaperis.

"Mi tuj rekuris kaj tiun fojon alvenis al la vaporŝipeto sen alia okazaĵo. Oni atendis min de longe. La maroficiro estis furioza. Ekvidante min en la malproksimo, li tuj indigne min alparolis. Sed kiam li vidis mian palecon, miajn vestaĵojn ĉifonaj, makulitajn de sango, li kvietiĝis, maltrankviliĝis. Oni rondiĝis ĉirkaŭ mi, oni sindoniĝis. Mi vin lasas juĝi kiel la rakonto pri mia aventuro est-

"Jen estas mia historio, infanoj miaj. Estas en tiu senalia fojo en mia vivo, ke mi konis la timon, la veran. Kaj nun, ĉu vi dubas, ĉu vi pensas ke mi fanfaronas, mi havas ion tie por pruvi ke ĉio tio ne estas fabelo. Mi havas pruvosignojn." Tion dirante, Lamigran'o forprenis sian kitelon, deklinigis sian ĉemizon, kaj montrante larĝan cikatron sur sia ŝultro, diris:

"Jen la subskribo de l'tigro, de lia Moŝto tigro, kiel diras la Annamlanduloj. Kaj tie, sur mia brako, tiu marko estas la postasigno de l'dentoj de la "Nigraflagulo!....

Nun estas via vico, oni aŭskultas.

Tradukis: A. P. BEAUCHEMIN.

## ANGLUJO

La Societo "Esperanto" persistas pri sia propagando kaj nun varbis membrojn el Italujo, Transvaal, kaj Ceylon, krom Angloj kaj Skotlandanoj, Wales (Velzujo?) prezentis membron. La Esperantistoj anglaj alvokas al siaj fratoj trans la mallarga maro unuiĝi kun si por ke la forteco devenu de unueco. Propagandan broŝuron, disdonotan senpage, la Societo nun pretigas.

JOHN ELLIS.

# INFANARA ANGULO



NENIA NOVAĴO!

—Bonan tagon, Ludoviko. Vi havas malgajan mienon, kiajn novaĵojn vi alportas de la patra domo?

—Nenian. sinjoro, escepte ke via maljuna kato mortis.

—Nur tio? Pro kio ĝi mortis?

—Ĝi mortis, sinjoro, pro esti manĝinta tro multe da viando.

—Kie do ĝi prenis tiom da viando?

—De la du kaleŝaj ĉevaloj, sinjoro.

—Ho! ili ankaŭ mortis? Klarigu do tion al mi.

—Bedaŭrinde, sinjoro, la malfeliĉaj bestoj ankoraŭ vivus, se oni ne estus ilin mortiginta, devigante ilin alporti tro multe da akvo.

—Da akvo ? Kial?

—Kredeble por estingi la fajron, kiam brulis via domo.

—Kion? mia domo brulis? Bona Dio, kia malfeliĉo!

—Ha! sinjoro, tiu malfeliĉo ne estus okazinta, se niaj kunuloj ne estus estintaj tiel neatentaj pri siaj lumingoj.

—Kial do ili bezonis lumingojn?

—Sinjoro, tio estis por enterigi vian patrinon.

—Ĉielo, ĉu estas eble! Mia patrino mortis?

—Dio mia, jes sinjoro, ŝi mortis pro ĉagreno.

—Por l'amo Dia, Ludoviko, diru al mi, kio povis kaŭzi tiel grandan ĉagrenon al ŝi?

—Kion vi volas ke ĝi estu, se ne la morto de via patro, kiu dronis en la lageto de l'kastelo.

—Mia patro dronis, Ludoviko?

—Jes, malsaĝiĝita de la malespero, pro la perdo, en unu tago, de sia tuta riĉeco.

Tradukis: BERTHE.

Deziras interŝanĝi poŝtkartojn :

OSCAR MILOT, 12 jara, adreso : 172 St-Denis, Montréal, Canada.

VITAL MALLETTE, 14 jara, adreso : Pointe-Claire, P. Q., Canada.

BERTHE ST-MARTIN, 11 jara, 79 St-Christophe, Montréal, Canada. La portreto de tiu ĉi knabino estas sur la koverto de "La Lumo".

JOSEPH FERRARIS, 13 jara, Marache, Nyon Suisse.

F. CHVATIK, 15 jara knabo, Bystrice-Hostyn, Moravio, Austrujo.

L. CHRYSTAENS, 24, rue de la Millery, Lacken, Belgique.

Knabo Adam Zamenhof, la filo de nia estro, 9 ul Dzika, Varsovio, Ruslando.

Knabino Suzanne Gribelin, baldaŭ naŭjara, Pailly sur Vingeanne, Côte d'Or par Seine sur Vingeanne, Francujo.

Knabino Odette Mayer, dekunu jara, zorgo de Sam. Meyer, Larochelle, Francujo.

Knabo Raymond Levy, dekses jara, 28, rue de la Paix, Le Havre, Francujo.

Knabino Sadie Samey bey, dekvarjara kaj ŝia fratino Eren-keuy, dektri jara, Konstantinoplon, Turkujo.

Knabo Théode Saint-Martin, dekkvarjara, 79, St-Christophe, Montréal, Canada.

Ciuj geknaboj kiuj skribos al mi, kaj diros ke ili deziras interŝanĝi komunikaĵojn mi enmetos ilian nomon, senpage, en tiu ĉi kolono.

## RONDIRANTO

Anstataŭ 3.50 frankoj por jarabono de la belega revuo "Rondiranto" estas nun 4 frankoj, sed la abonantoj estas rajtigitaj partopreni en lotpremioj.

## DES ACTES !

Certes les paroles sont quelques fois très belles, mais nous considérons que les actes ont encore plus de valeur, et cette opinion, nous sommes heureux de le constater, est soutenue par le journal "l'Aube", car nous lisons dans ce journal l'article suivant:

L'AUBE & L'ESPERO KATOLIKA

Nos lecteurs auront remarqué la modification apportée dans notre Revue.

"L'Aube", tout en continuant d'être l'organe des Cercles d'Etudes de Seine-et Oise, prend un caractère plus général et devient en partie une revue espérantiste.

Aurons-nous besoin d'apprendre à nos lecteurs ce qu'est l'"Esperanto". Ils ont certainement entendu parler de cette nouvelle langue, dont un cours est professé à Versailles pour les membres de la S. B. et suivi très assidûment, nous n'avons donc pas besoin d'expliquer en quoi consiste ce langage international auxiliaire, destiné à faciliter les relations entre les personnes de nationalités et langage différents.

Sa simplicité, la façon ingénieuse et logique dont ses règles sont composées, en font un merveilleux instrument de communication; le nombre de ses adeptes augmente chaque jour en France et surtout à l'Etranger; il recrute des adhérents principalement parmi les membres de l'Université, les savants, les professeurs, les voyageurs, tous comprenant qu'il répond à une nécessité, qu'il comble une lacune, qu'il rendra des services inappréciables à la science comme au commerce.

Il y a là un mouvement très sérieux et qui devient sans cesse plus important, car tout nouvel adepte de l'"Esperanto" en devient ausstiôt un propagateur ardent.

En présence de ce mouvement, des catholiques à l'initiative généreuse et hardie se sont dits qu'il fallait le faire servir au bien, et que cette nouvelle langue devait avant tout répandre dans le monde la Vérité. Les langues répandues dans la plus grande partie de l'univers, le grec et le latin, jadis, l'anglais aujourd'hui, ont été les meilleurs propagateurs de la vraie Foi; l'"Esperanto" peut et doit servir au catholicisme.

Une Société "Esperanto", catholique, "Espero katolika", l'espoir catholique, vient d'être fondée; naissante et encore à peine developpée, elle cherchait une publication pour servir de lien entre ses membres; elle a voulu s'adresser à une revue de jeunes, favorables au progrès, à la nouveauté, surtout au triomphe d'idées généreuses.

Elle a choisi l'"Aube" et nous avons accepté de grand coeur cette alliance. Nous sommes heureux de favoriser le développement de l'"Esperanto" et de le faire connaître à nos lecteurs; d'un autre côté, nous voyons là un moyen de répandre nos idées d'action sociale, d'éducation populaire, de formation catholique.

Plusieurs de nos camarades, nous en sommes certains, deviendront de fervents espérantistes, et nous avons la conviction qu'en lisant l'"Aube", plusieurs espérantistes approuveront nos idées et fonderont dans leur région des Cercles d'Etudes et des oeuvres de jeunesse.

Nous travaillerons ainsi les uns pour les autres et nous contribuerons davantage à faire triompher la Cause.

Voilà donc amplement justifiée la modification de l'"Aube", que nos amis aideront à developper encore, au cours de sa deuxième année.

J. SARDA

Président de la S. B.

***

Comme on peut le voir, il ne s'agit pas ici de simples paroles, mais d'un appui effectif, on se jette dans la mêlée, et l'on entend vigoureusement soutenir l'idée humanitaire et progressiste que préconise l'Esperanto.

"L'Aube" est l'organe du Cercle d'études Saint-Benoit, dont le président d'honneur est M. le chanoine Leblanc.

---

Cette revue mensuelle comprend:

Des "résumés" des Conférences inaugurées dans la salle de la S.-B. par la "Ligue d'enseignement catholique" ; — Des "articles de fond", dûs à une plume autorisée et connue, sur une question actuelle;— Des sujets de conférences avec indications bibliographiques ; — Des "chroniques artistiques et sportives";— La "bibliographie" des ouvrages les plus récents sur les questions économiques et sociales;—La chronique du mouvement jeune et catholique dans le département de Seine-et-Oise, en France et à l'Etranger; ;—Le compte-rendu spécial des travaux des Cercles d'Etudes de la région.

L'abonnement annuel n'est que de 3 francs.

Nous prions ceux qui désirent s'abonner à cette revue de s'adresser à M. Jean Giraud, 4, rue des Bourbonnais, Versailles, France.

---

## LA ORELO KIEL SIGNO DE LA PERSONA KARAKTERO

La orelo estas tre interesinda objekto por la fizionomia ellerno. Ĝi nome vidigas pli pri la ecoj de la homa animo, ol oni povus kredi.

Kiam oni parolas pri klera homo, oni ja ne ordinare pripensas la multoblon da fakoj sciencaj, de kiu la persono estas posedanto, sed oni pripensas, aŭ devus almenaŭ pripensi, la sumon da spirita nobleco, da efektiva klereco anima, kiujn havas li aŭ ŝi.

Sed miloj da homoj posedas la plej belajn ecojn, kvankam neniu tion scias. Ekzistas tiom da aliaj homoj, kiuj pli bone komprenas fari sin atentaj, brili kaj ravi per la malmultaj kapabloj, kiujn ili posedas.

Tial, ĉia helpo por la ellernado de la homa karaktero estas bona.

Kaj efektive, la orelo sciigas pri multe da ecoj de la portanto. Granda orelo, ekzemple, estas signo de saneco, sciigas, plie, ke la posedanto estas fortika kaj praktika. Se la orela fliko estas treege granda, ĝi vidigas malviglecon kaj materialistecon.

Malgranda orelo montras artan karakteron. Se ĝi estas eksterordinare malgranda oni povas esti certa, ke la persono estas prudenta kaj vivigata homo, eble iom malvarma de la naturo. La antaŭenstaranta orelo estas signo de lingva genio, memorpovo, metodo kaj sistemo,

La longa orelo estas certa signo de forto, gloramo kaj decideco. Se ĝi finiĝus plej supre per pinteto la persono estas treege gloravida. Tio persono neniam estas trankvila en simplaj cirkonstancoj. Kiel la orelo mem liaj sopiroj kaj emoj celas supren.

Kiam la orelo direktiĝas posten, ĝi estas signo de nervosa naturo.

Pli malfacile estas difini, kia orelo estas la plej bela, la ideala orelo; ĝi ne estas tiel facile metata sub ia regulo.

La greka orelo ja devus esti rigardata kiel ideala; ni kutimas preni la artajn modelojn de la Grekoj; kaj kial ne fari tion en tiu ĉi rilato. La longeco devas ĉirkaŭ simili tian de la nazo.

Kiam la orelo estas bela kaj la posedanto havas plaĉan voĉon, oni povas konstati, ne sole ke la persono havas bonan elvidon, sed ankaŭ ke ĝia karaktero kaj ecoj estas tiaj, kiajn oni povas deziri por si mem.

(De lingvo Sveda tradukis)

HUGO KARLSTEN.

Esp. 5527.

Rim.—Eble alia Esperantiste povus priskibi la okulon kiel karaktera signo, alia la voĉon. k. t. p. H. K.

## MARIE-THERESE

Sinjoro VADEL, 1 Place Denfert-Rochereau, en Parizo, havas la honoron sciigi al la karaj korespondantoj de la mondvojaĝonta letero, alnomata Marie-Thérèse — Mari-Terez, — ke oni ĝin poŝtirigos el Parizo en la unuajn tagojn de Aprila monato.

Por ke ĉi tiu letero faru, sukcese, sian tramondiron estas necese—eĉ necesega— ke ĝi poŝtirus rekomendite — tio kostas plie 10 centimojn.

Ĉiuj korespondantoj estos avizitaj, letere, kelkajn tagojn antaŭ la alveno de "Mari-terez".

Kelkaj korespondantoj, al kiuj nia amiko Vadel skribis pri tiu ĉi letero, ne ankoraŭ respondis. Ni petas de ili, ke tuj ili respondu, ĉar estas tre grave, ŝajnas al ni, ke la Mari-tereza letero trairu la tutan esperantujon kaj revenu hejmen.

## POŜTAKARTOJ EL-FRANCUJO

So. Hennebert, apotekisto, en Pont-en-Royans, Isère, Franclando, eldonis serion da ses poŝtkartoj ilustritaj redaktitaj en Esperanto enhavantaj, krom la portreto de sinjoro Zamenhof, Trumpeter, de Beaufront, René Lemaire, M. Meray kaj C. Bourlet, resumon de la historio de Esperanto en Francujo.

La serio kostas nur 90 centimojn.

Oni sin turnu al so. Hennebert; aŭ al "Turing Klubo", 10 Place de la Bourse, Paris.

Ni rekomendas al nia legantaro l'aĉeton de tia serio, ĉar ĝi konigas en esperantujo la portreton de kelkaj sindonaj amokoj de nia homara ideo.

## EL ANGLUJO.

La Societo "Esperanto" eldonis jus ilustritan poŝtakarton enhavantan la portreton de So. Zamenhof, kun la vortoj "LERNU ESPERANTON" La Sole Praktikan Lingvon Internacian; presitajn en ses lingvoj.

La societo vendas tiun karton: 25 por 90 centimoj; 50 por 1.70 franko, kaj 100 por 3.20 frankoj.

Oni sin turnu:

JOHN ELLIS, solicitor,

Keighley, England.

## HISPANUJO

Al Sinjoroj Direktoro kaj kunlaborantoj de LA LUMO.

Imitante la laŭdindan ekzemplon de la nacioj progresamaj kaj dezirante samtempe disvastigadi ĉe Hispanlando la mirindan kreajon de doktoro Zamenhof, oni fondis en Logronjo (Logrono) Grupon Esperantistan, inspiritan je la samaj ideoj de aliaj similaj Grupoj, kies celado estas la propagando de la bela kaj nobla lingvo internacia Esperanto.

La Grupo Esperantista Logronja, plenumante la konsenton unuvoĉan de sia kunsido ĝenerala — kiu okazis la 3an de marto lasta, — havas la honoron frate saluti al la Redakcio de LA LUMO, gazeto kiun multe priokupas la propagando de Esperanto, atinganta dank' al nobla, senĉesa laborado, rezultatojn pli kaj pli sukcesajn kaj efike kunhelpanta la efektivigon de la belega idealo de nia eminenta doktoro Zamenhof, glora kreinto de la lingvo internacia.

Logronon, la 22an de marto 1903a.

La sekretario,
JOSE M. BAIGORRI.

La Prezidanto,
JULIO FORIA.

## AMERIKA ESPERANTA KOLEKTO

La unua numero de nia "Amerika Esperanta Kolekto" jus estas eldonita el nia presejo. Tiu libreto enhavas malgrandan gramatikon kaj la vortaron Esperantan-francan. La Amerikanoj, precipe la Montrealanoj, povas aĉeti tiun libreton por 10 cendoj sin turnante al la Montrealaj librovendistoj. La Eŭropanoj sin turnu al LA LUMO.

## ESPERANTISTOJ ĈE LA EKSPOZICIO DE SAINT-LOUIS, 1904.

La Societoj por Instruado Postlerneja en Parizo jus kreis, je la propono de unu el siaj membroj — I. C. 205, — monoferajoj vojaĝaj por viziti Kanadon kaj Unuigitajn Ŝtatojn Amerikajn 1904. Tiuj ĉi monoferajoj estos po milo da frankoj kaj donitaj post konkurso. Ili permesos restadon de 20-30 tagojn en Ameriklando; la posedantoj vojaĝos 15-20-ope kaj estos ricevitaj kaj gviditaj de amerikaj korespondantoj kaj grupoj frataj. La sumoj de tiuj ĉi oferajoj estos liveritaj per donacoj po unu franko memvole faritaj de la membroj de grupoj diversaj. Tiuj ĉi frankoj — aŭ sumoj pli malgrandaj — devas esti liveritaj al la kasisto de la grupoj aŭ al komisiistoj rajtigitaj.

Komitato centra de sekretarioj generalaj de la Societoj por Instruado en Parizo devas noti la posedontojn kaj posedontinojn kiuj estos sciigitaj al ili en delegacioj elektitaj. La delegacioj prenos diversajn vojojn, donos unu al aliaj renkontojn en grandaj centroj kanadaj kaj amerikaj, laŭ sia volo sed devas sin ĉiuj renkonti en Saint-Louis je epoka fiksita.

Ni pensas ke certe la esperantistoj volu esti la unuaj por akceli tiun ĉi movadon kaj ke ili donu sian frankon solidaran al la kasistoj de siaj Societoj. Se unu Societo ne sufiĉus por kolekti milon da frankon, ĝi sin ligu kun unu aŭ kelkaj aliaj Societoj, kaj iliaj kandidatoj konkursu komune. La posedanto de la monoferajoj estu ilia prezentanto komuna.

CONCORDIA — S. E. I. C. — registros plezure la progresadon de tiu ĉi movado kies kreinto ĝi estas.

CONCORDIA.

## LISTE DES 71 SOCIETES ESPERANTISTES EXISTANT DANS LE MONDE, AU 1er MARS 1903

ALLEMAGNE—Glatz, Kiel.

AUTRICHE — Vienne, (Bohême) Prague, (Hongrie) Budapest, (Moravie) Brunn.

BULGARIE—Sofia, Philippopoli.

BELGIQUE—Bruxelles, Anvers.

CANADA—Montréal, club d'hommes, Montréal, club de femmes ; Boulevard St-Denis; St-Hyacinthe.

ESPAGNE—Logrono, Murcie, Santander.

GRANDE BRETAGNE — Londres, [Edimbourg], [Glasgow], Huddersfield, Keighley, [Liverpool], [Portsmouth].

FRANCE — Paris, Amiens, Anneçy, Beaune, Besançon, Bordeaux, Boulogne-sur-Mer, Calais, Chaumont, Dijon, Fontainebleau, Grenoble, Hautmont, Le Havre, Lille, Lyon, Marseille, Montpellier, Nancy, Nice, Reims, Roubaix, Saint-Omer, Saint-Claude, Tournon-Tain.

HOLLANDE—Hilversum.

ITALIE—Turin, Modène, Naples, Rionulato.

PEROU—Lima.

RUSSIE — St-Pétersbourg, Moscou, Odessa, Melitopol, Ourga, Smolensk, Arkangelsk, Vladivostock.

SCANDINAVIE — Stockholm, Sodertelge.

SUISSE—Lausanne, Nyon.

N. B. — Les Sociétés en formation sont entre le signe [].

**Résultat des examens du cours primaire au Klubo "Progresso"**

Vendredi le 17 Avril, ont eu lieu les examens du cours primaire d'Esperanto donné par M, Lippens, au Klubo Progresso.

Ont obtenu leur diplôme les personnes suivantes : Mesdames J. A. Morin, A. Saint-Martin, T. E. Huot, Mesdemoiselles A. Bibaud, A. Bourbonnière, Berthe Saint-Martin, Messieurs Achille Cusson, Charles F. Larkin, Rod. Carrière, J. A. Morin, H. Clovis Brossard, Théode Saint-Martin, Vladimir Gorbatenko, Joseph Bourgeois.

Le prochain cours sera donné par l'une des dames diplomées et sera ouvert vendredi le 24 avril courant à huit heures du soir au numéro 137a rue Ste-Elizabeth, coin Ste-Catherine.

Comme à la première leçon on enseigne la prononciation, nous recommandons à ceux qui désirent apprendre la langue internationale de se rendre à l'ouverture du cours.

L'entrée est gratuite.

## Esperantistoj !

Mi proponas al la korespondantoj portretojn en la formato de postmarkoj, por ke ili povu konigi sin almenau portrete. Mi faras la portretojn gis brusto au genuoj lau la deziro. La kosto de la malgrandigitaj portretoj estas : 30 ekz. : **2** fr. ; 60 ekz. : **3** fr. ; 100 ekz. : **5** fr. ; 300 ekz. , **12** fr.

Kadretoj de la sama kosto.

Oni sendu portreton kun la mendo kaj pago (se eble *ne* per postmarkoj).—6-8 tagoj estas necesaj por la plenumo de la n endo. Adr. : **En. Muller, Muhlingstrasse, , en Kiel (Germanujo).**— La klara profito estos uzata por la propagando de Esperanto en Germanujo.

# E. S. A.

## Esperanto Society of America

**137a St Elizabeth St.**
**MONTREAL**

**Aim** — Art. 1. This association was organized on the 15th day of March, 1900, for the purpose of propagating the international language, Esperanto, in America.

**Composition** — Art. 2. The members of this association are composed of three classes: — ordinary members, graduated members and propagators.

(*a*) The ordinary members are those approving of the aim of the Esperanto Society and prepared to contribute a regular yearly fee, while not proposing to learn the language.

(*b*) The graduated members are those who correspond with us in Esperanto, showing that they have sufficient knowledge of our language to be able to read and write Esperanto.

(*c*) Members entitled to the name of propagators, are those who can attract 10 new members to our association.

**Fee** — Art. 3. All the members of this association shall contribute $1.00 yearly dues, or a life membership fee of $25.00.

**Administration** — Art. 4. The executive committee of the association shall be composed of 10 members duly elected at a general meeting, on March 15th of each year, as follows: a President, a Vice-President, a Secretary, a Treasurer, and six Directors.

**Advantages** — Art. 5. The members will have the right of entry to the Association's meeting-rooms, will be privileged to read the Esperanto books and literature, and also all other magazines and other publications furnished. They will be able to follow the Esperanto course and will also receive the official organ of the association "La Lumo" a trilingual monthly illustrated journal.

Every year "La Lumo" will publish a full list of the names of members according to their class.

Volu sendi la jenan al nia Societo

**S. E. A.**

*Societo Esperanta Amerika,* 190__

*Volu enskribi mian nomon kiel membro de la societo por la propagando de Esperanto, en Ameriko.*

*Nomo* ____

*Profesio* ____

*Adreso* ____


# CONCORDIA

**REVUE INTERNATIONALE**

**Organe de la Société d'Etudes et de Correspondances Internationales.**

"La connaissance de l'étranger, c'est le commencement de la sagesse."

DIRECTEUR-FONDATEUR : EMILE LOMBARD, Professeur agrégé au Lycé Montaigne. Docteur en philosophie de l'Université de Leipzig.

Ĉiu monate, tiu bela revuo eldonas esperantan kronikon pri la paca movado, kaj artikolojn esperantajn. Sin turni : 77 rue Denfert-Rochereau, Paris. Kosto de jarabono 8 frankoj aŭ $1.60.